
# BONA ESPERO



Cirkulero por amikoj, subtenantoj kaj membroj de la "Subtenanta Asocio de BONA ESPERO e.V,"

n-ro 12 · novembro 1984

Ktoj: Sparda-Bank Münster, BLZ 400605 60, Kto-nr. 900 826 BONA ESPERO
Postscheckamt Dortmund: 2033-99-456

---

Ne miru pri la 'blua sunradio' kiel nomas ĝin alia fervora esperantista societo. Ni ĉifoje metis pagilon en ĉiun koverton, eble kiel instigon, memorigilon, aŭ kune kun kelkaj klarigaj informoj, por amikoj, parencoj, ktp. Pri la ekonomia stato de la brazila ŝtato vi legas kaj aŭdas ĉiutage en la amas-komunikiloj. La ekonomia stato de BONA ESPERO komencas solidiĝi pro via fidela komuna subteno kaj pro ilia nerompebla energio. Antonio, unu el la 'malnovaj' filoj de BE revenis kun edzino kaj filineto. Li nun subtenas Guiseppe Grattapaglia. Unuaj rezultoj de la kunlaboro estas novplantita, grandega banankampo, fruktarboj, pligrandigo de la legomĝardeno kaj - helpe de kokinoj - propra ovoproduktado. Ankaŭ Ursula ricevis subtenon en ĝardeno kaj kuirejo pere de Anamaria kaj Dorcelina, du grandaj (ĉar 14-jaraj) knabinoj. Ĉu problemo nutri ĉiutage 26 homojn? Tute ne, se provizejo kaj ĝardeno estas bone plenigitaj! Niaj pagoj, kiuj nun regule alvenadas tie dumonate, certigas al ili la necesajn viv- kaj lernrimedojn kaj kuraĝigas ilin daŭrigi tiun malfacilan laboron.

''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''

Ĵus el BONA ESPERO, tiel komencis cirkulero 11; tiel ni invitis dum junio aŭskulti al Elfriede Kruse, freŝe reveninta el BE. Siatempe ni ne sciis, ke preskaŭ samtempe Sonja Barthel el Lüneburg vizitis BE.-n. Dum nia kunveno, la 30.6.84 en Münster, Elfriede kaj Sonja raportis. Elfriede kiel multjara esperantistino kaj amikino de BE, Sonja kiel tute nova adepto de nia lingvo kaj tute sobra dumtempa helpantino de nia 'evoluprojekto'. Verŝajne ankaŭ ŝiaj impresoj estas informaj kaj interesaj por tiuj multaj el ni, kiuj neniam havos okazon veturi tien, sed tamen ŝatus ne nur scii ion pri infanoj kaj domaro, sed ankaŭ pri pejzaĝo, najbaroj, vizitantoj. Jen kion ŝi skribas pri la pejzaĝo!

Malfacile priskribi pejzaĝon, kiu unuavide ne estas impona. Ege impresas la nubaro. Neniam mi vidis nubojn, tiom buliĝintajn, ke ili efikas plastaj. La multkolorecon ne nur kaŭzas la suno, sed la nuboj mem. De la plej malhela viol-koloro ĝis blanko kun resto da bluo ene, vi trovas tiujn kontrastojn tute proksimaj kun nur iom da normale blua ĉielo kvazaŭ ligilo. BE situas en alteco de 1600 m sur ebenaĵo, ĉirkaŭita de montopintoj, krutaj aŭ modere kuŝantaj. Eble pro tio la matena orient ĉielo plej ofte estas ruĝ-ora. La koloro de la montopintoj rapide ŝanĝiĝas kaj vespere tiu kolor-orgio estas ankoraŭ pli impona, ĉar pli rapida. Ruĝ-ora, viol-kolora, blua, ĉiuj koloroj prilumas la montojn kaj la montaro aperas kiel silueto antaŭ la malsupreniĝanta suno, kiu ĉiam rapide malaperas. Blunigraj estas tiam la montopintoj; en la fono pompas la suno kiel sur malkaraj poŝtkartoj, tiel neimagebla. Kaj ĉiuvespere prezentiĝas nova ĉielo kun aliaj kolornuancoj kaj nubaro. Ke la

somero en Goiás (la federacia ŝtato, en kiu situas BE), estas pluvsezono, tion vi scias! Tiam la savanon rapide kovras tapiŝo el alta herbo kaj la etaj arbedoj estas kaŝitaj. Laiko tute ne suspektas, kio ĉio estas kaŝita en la herbo. Oni ja vidas kripligitajn arbojn, iliajn siluetojn antaŭ blua ĉielo, sed ne la serpenton, kiu ripozas sur seka loko. Ĝi ja ne atakas, kiam ĝi estas sata. Sed ĉu oni scias, ĉu ĝi estas sata? Do, prefere eviti serpentojn, satajn aŭ malsatajn kaj sekvi jenajn konsilojn, kiujn oni donis al gastoj kiel mi:

Ĉiam surmetu kaŭĉukajn aŭ fortikajn ledajn botojn, se vi iras en la savanon!
Iru nur sur vojoj, tie vi kutime ne renkontas serpentojn!
Iru neniam sur vojoj! Serpentoj scias, ke preskaŭ ĉiuj etaj savanaj bestoj uzas la vojojn, por pli facile kuri, la malsata serpento atendas ilin ĉe la vojorando kaj kaptas.

Kion nun fakte fari? Botoj! Nu ja, ilin mi surmetas kaj mi iras tiam sur la vojoj aŭ tra la herboj - ĝuste kiel konvenas.

Aŭtuno estas la komenco de la seka periodo. Vintre tute ne pluvas kaj tio estas la sezono de la vastaj bruloj. Dum somero kreskis ja multaj plantoj, arbedoj kaj arbetoj, kiuj nun sekiĝis. Ofte Fajrero sufiĉas por kaŭzi multkilometran brulon. Kaj tiam estiĝas tiuj skurilaj siluetoj el karbigitaj arbotrunkoj, el kiuj poste tamen kreskas novaj folioj; kiam la pluvo revenas.

Mi ne povas priskribi la centojn da diversformaj, diverskoloraj floroj. Prefere mi rakontas al vi, kion mi vidis kaj spertis dum unu el la multaj promenadoj, kiujn mi faris kun Victor Sadler kaj tiuj infanoj, kiuj emis akompani nin. Unue ni ĉirkaŭis la akvo-baraĵon, kie la infanoj sin ĉiam banas. Ni venis al la loko, kie la eta rivero fluas en la lagon, kie kriantaj papagoj sin svingas en branĉoj de kuriozaj arboj. Ekzistas ankaŭ aliaj birdoj, similaj al niaj pegoj kaj vulturoj. Ni daŭrigas nian vojon al la montoĉeno, kiu ŝajnas tiel proksima. La knabinoj jam deziras kolekti florojn, sed mi petis atendi ĝis la revojo, alie ili sekiĝus. La orĥideoj restis ankoraŭ nerikoltitaj. Ili kuras dekstren - maldekstren, prenas tie beron, jen nukson, suĉas ĉe folioj aŭ maĉas ĉe certaj herboj. Ĉu natura instinkto, ke ili neniam kaptas ion venenan, nemanĝeblan? Mi ne volas aserti, ke ĉio, kion ili donis por gustumi, mi duan fojon manĝus. Sed mia stomako ne ribelis kaj mi neniel malbonfartis. Strange aspektis ananaso-similaj kreskaĵoj, kies sukon ni trinkis kaj aliaj grandaj fruktoj, kiujn ni devis senŝeligi per la dentoj, por tiam manĝi la flavan internon, iom nespicitan, sed sukan; do konvena por tiu ŝvitiga vetero.

Fine ni tamen atingis la montopiedon kaj komencis suprengrimpi. Trans ŝtonoj kaj truoj ni penis, densaj arbedoj kun akraj dornoj baris nian vojon, sed fine ni atingis la supron. Ĉiu elektis sian 'tronon' kaj tiam ni rigardis sur nian 'regnon'; la lernejon, la infandomon, la dometon de Victor kaj la pioniran. Tra la teleskopo ni vidis Beppe kondukanta ĉevalon kaj Ursula kun unu el la malgrandaj knabinoj ĉe la mano. Ĉu ili atendas nin?

Ekskurso per ĉevalĉaro  En cirkulero 13 Sonja rakontas pri dimanĉa ekskurso al parencoj de Antonio. Cirk. 13 vi ricevos jam komence de jan. 1985, kune kun la kvitancoj por 1984, informoj pri jarĉefkunveno k.a.

Iom da gajo kaj iom da ĝojo,
multe da sano kaj (iom da mono)

ni deziras al ĉiuj amikoj de BONA ESPERO,

ke ni havu la forton ankaŭ en 1985
forigi iomete la maljustecon en la mondo!

Kore via Margret Bradley

ankaŭ ĉifoje respondeca: Brinker Damm 24
D-4404 TELGTE